

BULTENO de REU

OFICIALA INFORMILO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO
№ 100, Decembro 2018

Karaj amikoj!

Finiĝas la jaro 2018. Ĝi estis sufiĉe fruktodona kaj ni faris por disvastigo de Esperanto kaj plifortigo de nia movado sufiĉe multe. Kompreneble, dezirindus pli – sed niaj fortoj kaj energio ja ne estas senlimaj. Kion ni ne faris ĉi-jare, ni faru sekvontjare. Kaj, kvankam ĝi onidire apartenos al Porko, ankaŭ tiu besto estu por ni verda kaj agrabla!

Bonan fruktodonan Novan, 2019-an Jaron! Sukcesojn en ĉiuj niaj esperantistaj agoj!

Via Estraro de REU



Samuil Marŝak



DECEMBRO

En decembro-monat'
Vestas arbojn neĝbrokat'.
Nokte la riveron pontis
Per glacio Avo Frost',
Novajn sledojn al ni portis
Kaj abion el la forst'.
La abio nokte larmis
Pro la hejma hejttubar',
Sed matene ĝi ekĉarmis
Per arom' de la Novjar'.
Ekaspektis ĝi efekte
En la festa beldekor'.
Laŭ la branĉoj-ŝtupoj lerte
Brillumetoj kuras sor.
Ornamaĵoj ŝprucas helon.
Plej kuraĝa lumlampet'
Sur la pint' abia stelon
Eklumigis per arĝent'.

Kiel tago, jar' trapasis.
Super Moskvo en purpur'
Dekdufoje jam trabatis
Ĉefhorloĝ' sur Kremla tur'.

Traduko de Ludmila Novikova

Jubileo

Garik Kokolija 55-jara



Ni gratulas eminentan esperantiston Georgij Kokolija okaze de lia jubileo. Kontribuo de Garik al Esperanto-movado de Rusio (kaj ne nur Rusio!) estas neimageble granda. Li estis unu el ĉefaj ĝiaj motoroj dum ĉirkaŭ 30 jaroj, kaj liaj meritoj estas nekompareble grandaj. Malfacilas imagi la jarmilŝanĝon kaj komencon de la 21-a jarcento sen REGo. Pluraj bonege organizitaj renkontiĝoj, iniciatoj, aliaj agoj faras nian movadon lia eterna ŝuldanto. 55 estas aĝo tre bona – energio plu grandas, sed la viva sagaco jam maturas. Ni deziras al Garik plian energion, sanon, aktivecon kaj esperas, ke li iam denove dediĉos siajn fortojn al de ni ĉiuj amataj lingvo Esperanto kaj lando Esperantio!

Estraro de REU

RUSIA ESPERANTISTA UNIO
PROTOKOLO № 14 de la Estrara decido
Dato: Moskvo, 20. 11. 2018

Voĉdonado: reta
Voĉdonis S. Smetanina, N. Gudskov , I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.
TAGORDO / TEMO
Pri la Regularo “Eminente rusia instruisto de Esperanto (de la lernojaro...)”

DECIDO

1) Akcepti la prezentitan de V. Opletajev projekton de la Regularo “Eminente rusia instruisto de Esperanto (de la lernojaro...)”, kun posta konfirmo de la Regularo per decido de la sekva REU-Konferenco.

REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:

por: 6 ;
kontraŭ: 0 ;
sin detenis: 0 .
Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

RUSIA ESPERANTISTA UNIO
PROTOKOLO № 15 de la Estrara decido
Dato: Moskvo, 25. 11. 2018

Voĉdonado: reta
Voĉdonis S. Smetanina, N. Gudskov , I. Gonĉarova, A. Mitin, V. Opletajev.
TAGORDO / TEMO
Pri “Decembra poezia marŝo de esperantistoj” - propono de Raja Kudrjavceva (Jekaterinburgo).

DECIDO

1. Aprobi la iniciaton de R. Kudrjavceva (Jekaterinburgo) pri organizo de tutlanda aktivaĵo “Decembra poezia marŝo de esperantistoj”, dediĉita al la 129a naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof.

2. Komisi al R. Kudrjavceva kaj I. Gonĉarova , estrarano de REU, respondecu pri la regiona agado, gvidi la projekton (t.e. informi pri la aktivaĵo kaj aktivigi kolektivojn kaj apartajn esperantistojn en regionoj kaj urboj de Rusio, kolekti informojn pri ĝi, prezenti rezultojn).

3. Komisi al A. Mitin, estrarano de REU, helpi la gvidantojn de la kampanjo pri publikigo de tekstaj kaj videaj materialoj en la retejoj de REU (paĝaro REU.RU, grupo “REU” en “Vkontakte”).

4. Okazigi la tutan programon en la periodo de la 10a ĝis la 25a de decembro 2018.

REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:

por: 5;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 1.
Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

RUSIA ESPERANTISTA UNIO
PROTOKOLO № 16 de la Estrara decido
Dato: Moskvo, 01. 12. 2018

Voĉdonado: reta
Voĉdonis S. Smetanina, N. Gudskov , I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.
TAGORDO / TEMO
Pri Esperantisto de la jaro 2018 laŭ la versio de REU.
Esperantisto de la jaro 2018.

DECIDO

Proklami membron de REU s-on Vladimir Sapojnikov (Krasnojarsko) Esperantisto de la jaro 2018 pro la grava kaj sukcesa agado sur la posteno de regiona kunordiganto de REU en Siberia regiono kaj pro la aktiva partopreno en la tutrusia esperantista movado.

REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:

por: 6 ;
kontraŭ: 0 ;
sin detenis: 0 .
Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

**Regularo
pri la “Eminente rusia instruisto de Esperanto (de la lernojaro...)”**

1. La proklamo de la Eminente rusia instruisto de Esperanto (laŭ la versio de Rusia Esperantista Unio) celas:
 - atentigi la rusian esperantistaron pri la graveco de la popularigo, disvastigo kaj instruado de Esperanto kiel unu el la bazaj celoj de REU;
 - rekoni kaj plialtigi la rolon de instruantoj de Esperanto en Rusio;

- honori plej elstarajn perantojn de Esperanto, kiuj atingis distingindajn rezultojn ene de unu lernojaro, kaj publike aprobi ilian agadon kaj instruspertojn.
- 2. La proklamo de la Eminentan rusian instruiston de Esperanto koncernas precipe kvar ĉefajn kampojn en la instruista agado de ĉiu kandidato:
 - instruado de Esperanto en Rusio en diversnivelaĵoj kursoj;
 - daŭra patronado de kursfinintoj;
 - diskonigo de propraj instruistaj spertoj;
 - verkado kaj publikigo de materialoj pri instru-metodika kaj lingvistika temoj.
- 3. La lernojaro estas instruperiodo, kiu komenciĝas en aŭgusto de la antaŭa jaro kaj finiĝas en junio de la posta jaro.
- 4. La Eminentan rusian instruiston de Esperanto proklamas la Estraro de REU ĉiujare en junio, konsiderante la rezultojn de la pasinta (juse finiĝinta) lernojaro.
- 5. Kandidatojn nomumas membroj de la REU-Estraro, prezentante al la Estraro koncizan noton pri la proponata kandidato. La estraranoj rajtas nomumi po unu kandidato.
- 6. La Estraro elektas la Eminentan rusian instruiston de Esperanto el inter individuaj membroj de REU, membroj de asociitaj kolektivoj de REU aŭ personoj, kiuj ne membras en REU sed meritas la honoran titolon.
- 7. La Eminentan rusian instruiston de Esperanto estas elektata de la estraranoj el la nomumitaj kandidatoj per relativa plimulto de la voĉoj. Se rezulte de la nomumado estas nur unu kandidato, la estraranoj voĉdonas por tiu kandidato.
- 8. Kandidatigante instruiston de Esperanto por la honora titolo "Eminentan rusian instruiston de Esperanto de la lernojaro ..." la estraranoj devas konsideri praktikajn rezultojn kaj atingojn de la kandidato en la pasinta lernojaro:
 - sukcese gvidita(j) baza(j) kurso(j) de Esperanto en Rusio;
 - sukcese gvidita(j) progresiga(j) aŭ altŝtupaj kurso(j) de Esperanto en Rusio;
 - daŭra patronado de finintoj de la baza kurso cele de ilia sukcesa esperantista enkomunumiĝo aŭ preparo de ili al pli altŝtupa lingva ekzameno;
 - diskonigo de instruspertoj fare de la kandidato per organizo, okazigo de instru-metodikaj seminarioj, metiejoj aŭ aktiva partopreno en similaj aranĝoj; informado pri kursoj per dissendolistoj, Esperantaj revuoj, asociaj bultenoj ktp.;
 - akurata raportado al la Estraro de REU pri atingoj dum la lernojaro;
 - verkado kaj publikigo de artikoloj pri instru-metodika kaj lingvistika temoj en rusiaj kaj internaciaj periodaĵoj.
- 9. La eminentan rusian instruiston de Esperanto ricevas honorfolion, subskribitan de la Prezidanto de REU, librodonacon kaj senpagan jaran re-aligon al REU.
- 10. La Eminentan rusian instruiston de Esperanto povas esti ne proklamita, se entute neniu persono estos kandidatigita de la membroj de la Estraro.

Rusia esperantisto de la jaro

Vladimir Sapojnikov

Vladimir Sergejeviĉ Sapojnikov naskiĝis la 8-an de aŭgusto 1951-a jaro. Naskiĝinte en vilaĝo Borovlanka (Sorokinskij – nun Zarinskij rajon de Altaĵa regiono), ĝis la kvina klaso de la mezlernejo lia familio migris tra vilaĝoj kaj urbetoj de la regiono, ĝis la alveno en la urbon Barnaulo. Dum la lernado, en la deka klaso, lia samklasano kaj amiko Sergeo Sirotkin ofte rakontis pri Esperanto kaj E-kursoj, kiujn li sukcese finis. Ekinteresiĝinte pri la fenomeno, Vladimir, tuj post fino de la mezlernejo, aŭtune de la 1968-a jaro komencis viziti E-kursojn ĉe la Domo de Instruistoj en Barnaulo, kiujn finis februare de 1969-a jaro. La unua periodo de la esperantistiĝo estis por la movada novico kurta, sed abunda je agrablaj eventoj kaj agoj. Plej grava estis tio, ke li trafis dum la lingvostudado en bonegan kolektivon de la urba esperantista klubo "OAZO". La kursojn gvidis tiama prezidanto de E-Klubo Anatolo Gonĉarov. En vicoj de la aktivularo estis junaj kaj talentaj esperantistoj, kies familinomoj ĝis nun konatas en la Esperanto-komunumo - Dina Lukjanec, Vjaĉeslav Romanov, Valentina Kazanova, Ljoŝa Gindin, Zina Miŝina, Viktor Ĉaldajev, Viktor Jakovlev, Jura Vladimircsev kaj aliaj ne malpli memorindaj samideanoj. Dum unu jaro, restinta ĝis la fino de militservo, kun tiu ĉi bona kompanio Vladimir sukcesis fari multegon da interesaj aferoj: kunpreparis internacian ekspozicion de infandeseĝnaĵoj en la urba artgalerio; vizitis Moskvon kaj Leningradon, kie renkontiĝis kun multnombraj eksterlandaj geesperantistoj (la partoprenintoj de UK en Helsinko); kaj grandgrupe partoprenis SEJTon-11 (Karpatio, USSR); ankaŭ ekkontaktis koresponde kun pli ol 40 eksterlandaj geesperantistoj... Tiel rezultis la unua esperano-periodo en vivo de Vladimir Sapojnikov. Post tri jaroj de militmarista servo (1969-1972) Vladimir iĝis studento de Krasnojarska ŝtata universitato (biologi-kemia fakultato). Dum la universitata studado Vladimir estis



socia aktivulo kaj vigle organizis komsomolan agadon en la fakultato. Sed preferis li disvolvi direkton de la internaciisma edukado kal rezulte, fine de 1974-a jaro, kunlaborante kun la universitata katedro de fremdlingvoj kaj la komsomola komitato li fondis studentan Klubon de Internacia Amikeco (KIA), kiu strukture enhavis tri sekciojn: de angla, germana kaj Esperanto lingvoj. De septembro 1974 -a Vladimir kolektis unuan grupon de E-kursoj, kiu iĝis bazo de la KIA-sekcio kaj, sekvontjare, Esperanto-fako de Fakultato de Sociaj Profesioj (ФОП КрaсГУ). E-sekcianoj agis aktive dum 1975-a jaro kaj atingis multajn sukcesojn: partoprenis OSER-on por komencantoj (februaro, Barnaulo) kaj OSER-24 en Mejdureĉensk (majo); venis granddelegacie al SEJT-17 (Ustj-Kamenogorsk), kie dum la konferenco estas akceptitaj en SEJMon kiel klubo-membro kaj aŭtune, ricevinte ejon en la urba Palaco de

Kulturo estis oficiale konfirmitaj dum kunsido de la urba komitato de VLKSM kiel "Городской клуб эсперантистов". Dum periodo 1976-1979 jaroj Vladimir estis membro de SEJMKomitato (komence respondecis pri fakoj kaj servoj, poste - pri propagando). Ekde la fondo de ASE (la 1979-a) kaj ĝis la malfondo en la 1989-a li estis ASE-estrarano. Estis SEU-estrarano ĝis disfalo de USSR. Dum periodo 1983-1986 jaroj, laborante en la teritoria Domo de Junularo (КДМ крайкома ВЛКСМ) fondis helpe de kelkaj samideanoj Krasnojarskan Teritorian Societon de Esperantistoj (ККОЭ), kiu sukcese funkciis paralele kun la urba EK. Aperis tiutempe pli ol 300

individuaj membroj kaj kelkaj E-grupoj en la regiono. Sub gvido aŭ patronado de V.Sapoĵnikov Krasnojarska Esperantista Klubo (KRESKO) iĝis bona kolektivo kaj funkcia modela strukturo. Multaj soveta E-kolektivoj imitis kaj transprenis ĝian sperton. Sed tio ne estas merito de sola homo, Vladimir ĉiam inklinis al la kolektiva gvidado kaj faris ĉion por eduki novajn geaktivulojn. Pro tiu politiko la kluba kolektivo ĉiam havis dekojn da talentaj individuoj, agipovaj, iniciatemaj kaj egalrajtaj. Kune ili organizis dekojn de E-aranĝoj, 5 OrSEJT-ojn, multajn OSER-ojn. La klubano ĉiujare ofte kaj multnombro partoprenis diversajn regionajn, tutsovetajn kaj internaciajn E-renkontiĝojn kaj kongresojn. En 2008-a jaro kelkaj krasnojarskaj esperantistoj decidis revivigi la kluban vivon kaj Vladimir revenis al la aktiveco. Nun Vladimir dank' al penoj de la samideanoj Jelena Ŝaravina, Evelina Sokolova, Sergeo Ĵilejkin, Sergeo Maksimov kaj aliaj aktivas en la klubo, ankaŭ en Siberia kaj Tutrusia E-movado. Li memvole ekdeziris esti REU-kuordiganto en la Siberia Federala Arondismento (CFO). Tiu ĉi agado estas nesimpla, sed multaj pozitivaj paŝoj estas faritaj.



En la kluban aktivaron eniras ankoraŭ ĉirkaŭ 20 personoj, kiuj estas bazo de la membraro. Interna vivo de la klubo estas regula kaj evoluanta: ni havas propran oficejon – Esperanto-Centro en Bebel, 57, kie okazigas ĉiusemajne la klubajn kunvenojn kaj estrar-kunsidojn; ankaŭ en la centro funkcias E-biblioteko kaj gastaj ĉambroj; En la oficejo ni ofte akceptas rusiajn kaj eksterlandajn E-gastojn. Estante diplomita specialisto pri la kluba agado Vladimir persone strebas konstrui nuntempan funkciantan strukturon de la klubo, kiel tio estis dum la unuaj jardekoj de la kluba ekzisto. Kun helpo de la samideanoj tiu celo estas realigata. De 2015-a jaro en la regiona biblioteko (la ŝtata universala scienca biblioteko de Krasnojarska regiono = ГУНБ Красноярского края) oni konstante varbas kaj instruas grupojn de E-kursoj. Ekde aprilo de 2016-a jaro la kursojn kolektas kaj gvidas V.Sapoĵnikov. La rezultoj estas dume modestaj (iom pli ol 15 kursfinintoj), sed homoj venas dum ĉiu varbkampanjo kaj studas Esperanton. La regiona biblioteko iĝis por KRESKO stabila publika loko por popularigi kaj instrui Esperanton, por 2019-a jaro en la biblioteko estas planita ĉiunonata E-prelegejo (krom konstante funkcia baza E-kurso kaj la paroliga klubo - trifoje semajne). La dua agadkampo, kiun Vladimir paralele atentigas kaj penas evoluigi estas lia aktiveco kiel REU-kuordiganto en Siberia Federala Arondismento (CFO), ĉi tiun komision li plenumas de oktobro 2017-a. Preninte ĉi socian laboron memvole, li certas, ke dekomence endas rekonstrui la nefunkciantan reton de la lokaj REU-reprezentantoj, kies ideo kaj Regularo ekzistas delonge kaj estas fiksitaj en la Dokumentaro. Dum duonjaro estis kontaktitaj deko da personoj, kaj li sukcesis konvinki kelkajn estiĝi la komisiitoj. Kiel estas rimarkite, la funkcia reto de reprezentantoj aperis nur en Siberio: Katerina Arbekova (Novosibirska reg.), Vladimir Minin (Tomaska reg.), Vasilij Masjagin (Omska reg.), Vladimir Sapozhnikov (Krasnojarska reg.), Dmitrij Piminov (Ustj-Ilimsk), Ikar Akimenko (Barnaul), Tatjana Kolajeva (Novokuzneck), Pavel Jakovlev (Omsk), Artjom Surnin (Kemerovo). La grupanoj aktivis diverse, sed la rezultoj pozitivaj aperis: krom tri ekzistantaj E-klubo (Kr-sk, Nov-sk, Tomsk), dum la pasinta jaro stabile ekfunkciis "Oazo"(Barnaul) kaj "Cedro"(Novokuzneck). Vigliĝis ankaŭ E-grupo en Omsko. En Siberio aperis nova tradicia vintra E-renkontiĝo "Novojarsko", kiu jam estis trifoje kaj la kvaran fojon okazos en Krasnojarsk! Sendube, ke NOVOJARSKO akceptis stafeton de iam famaj OSER-oj! Dum kunsido de REU-reprezentantoj en RA-13 oni decidis esplori eblecojn organizi regulajn majan kaj someran renkontiĝojn de siberiaj esperantistoj. Estas planoj organizi Konsilion de Siberiaj Esperantistoj sub aŭspicio de la regiona REU-kuordiganto, kiun eniros la klubgvidantoj kaj lokaj REU-reprezentantoj. Vladimir Sapozhnikov turnas sian atenton enklube kaj enregione al ĉefaj organizaj direktoj: popularigo kaj instruado de Esperanto; varbado de esperantistaro por partopreno en la organizitaj formoj de E-agado (klubo, asocio, REU k.t.p.); organizo de la regiona Reto de lokaj REU-reprezentantoj kaj aktiva kunlaboro inter la kluboj kaj E-aktivuloj.

Zamenhof-tago

La neordinara naskiĝtago
Lumas al la brua vivomar'.
Bonespere flirtas verda flago
Por tutmonda esperantistar'.

Sonis plej humane l' sortelano
Je la granda karmemora nom',
Ke parolu ne ital' kun dano,
ne arab' kun ĉin', sed hom' kun hom'.

Kaj ni renkontiĝu malgraŭ ĉio,
Esperanto vivas en la vort',
En la verda land' Esperantio
Je l' mirinde nevenkebla fort'.

Sed en prem' de tempomankrezistoj
Ĉu nun viglas Esperanto-flu'?'
Ĉu por nomi nin esperantistoj
Ni sufiĉe multe faras plu?

REToj, TEMoj, UKoj, la ceteraj
Okazonte, voku al kuniĝ',
Brilu ili vastaj kaj liberaj
Kiel al la Majstro sindediĉ'!

Jaroj-tagoj ĉiam plu tempestas
Je malpac', malĝoj' kaj malfavor',
Sed naskiĝon de la Majstro festas
Ni el plej dankema nia kor'.

Klara Ilutoviĉ

Krasnodaro

Ni tre serioze prepariĝis por celebri la 159-an naskiĝtagon de L.L.Zamenhof kiel Libro-Tago. Rememoris interesajn faktojn el la vivo de la Majstro, ĉerpitaj el libroj. Lau rondo prezentis po 1-2 originalaj poemoj au versaĵoj de Zamenhof. Estis deklamitaj "Ho, mia kor' ", "Preĝo sub la verda standardo", "La Vojo", "Al la Fratoj", "Mia Penso", kaj aliaj verkoj de Zamenhof... 2 pecoj el Julio Baghy ("Ĉe fenestro de vagono", "Estas mi esperantisto") estis deklam'-legitaj de Nina Celikova. Marina Kocarj preparis donacetojn al ĉiuj ĉeestantoj en formo de arkivaj poŝtkartoj kun E-stampo, glumarko "verda stelo" kaj personaj gratuloj okaze de la Z-Tago +2-3 proverboj, prenitaj el Proverbaro Esperanta.

Ĉiu donacato, ricevante la poŝtkarton, tradukis al la rusa "siajn" proverbojn. Ekz., "Amiko fidela estas trezoro plej bela", "De l'koro spegulo estas la okulo", "Lango nenion atingas, se ĝin saĝo ne svingas", "Ne iru al fremda anaro kun via regularo", "Barbo potenca, sed kapo senseca", "Kiu timas bestaron, ne iru arbaron", "Vortoj sakon ne plenigas", ktp.

Marina Kocarj



Tomsko

La 16-an de decembro 2018 13 esperantistoj en Tomsk (Rusio) festis la 159-an naskiĝtagon de nia kara majstro L. Zamenhof ĉirkaŭ la festotablo. La prezidanto de Tomska Esperanto-Klubo Konstantin Obrazcov gratulis nin ĉiujn okaze de la festo kaj tostis honore al la naskiĝinto. Inter ni estis 18-jara studento Alen el Kazahio (Semipalatinsk), kiu komencis lerni E-on en la E-kurso de Konstantin komence de oktobro 2018 kaj jam parolas en E-o.

Geĉjo Basov deklamis poemojn de Balmont en E-o. Raŝida Talgatovna Birjulina kantis romancon "NE, LI NE AMIS" en E-o. Tiun romancon mi tradukis el la rusa.

Mi ankaŭ raportis pri mia partopreno en la SEMINARIO PRI OPOZICIA GERMANA LITERATURO en Stuttgart (Germanio) la 25-an de novembro 2018.

Kaj fine ni spektis animacian kinofilmon "Max kaj Mary" kun Esperanto-subskriboj. La kinofilmon el la angla en E-on tradukis tomskaj e-istoj.

Vladimir Minin

Sankt-Peterburgo

La renkonto okazis la 19-an de decembro en Petra-Paŭla fortreso de Sankt-Peterburgo.

En la programo estis: Salutvorto de Svetlana Ejst; Raporteto de Anatolo Sidorov pri Tago de Esperanta Libro.

Poste laŭ invito de "Kariljono" originala muzikisto Andrej rakontis pri Orienta mizikiloj "idjenidu" (longega fluto) kiu estas disvastigita en Hindio kaj ceteraj orientaj landoj. Ankaŭ pri fluto de antikvaj rusoj kiun uzis paŝtistoj de ŝafoj. La tria muzikilo estas "vargan" (metala ilo, kiun oni tenas en la buŝo kaj trempas unu kordon). Poste estis prezentita video pri antikva lukto japana aikido.

Ĉeftemo de la vespero estis prelego de Johannes Haazen pri Zamenhofo kun posta traduko en la rusan, ĉar estis gastoj neesperantistaj. Entute partoprenis 20 personoj. Fine Svetlana Ejst dankis ĉiujn kaj gratulis okaze de l' festo.

Anatolo Sidorov



Moskvo

Por la Zamenhofa vespero en la klubo "Lev Tolstoj" kolektiĝis 10 personoj.

La kunvenejon ornamis E-flago kaj portreto de Zamenhof.

La vesperon komencis Nikolao Gudskov. Komence li prezentis la novan poemlibron de Mikaelo Bronŝtejn "Viv-teatro" kaj ĉefteme faris interesan, vigle akceptitan prelegon pri la deveno kaj variaĵoj de la familia kaj persona nomoj de Ludoviko Lazaro Zamenhof (laŭ la esploroj de A. Korĵenkov).

Estis voĉlegitaj de Zamenhof: "Ho mia kor'" (Irina Gonĉarova kaj mi, ni

dividis la tekston poduone), monologo de Hamleto "Ĉu esti aŭ ne esti" el Z- traduko de Ŝekspiro (Nikolao Gudskov), "La vojo" (Svetlana Smetanina). Klara Ilutoviĉ legis sian novan versaĵon pri Zamenhof. Ludmila Novikova kantis sian tradukon de la romano "Гори, гори, моя звезда" (Ĉujevskij, muziko de Bulaĥov). Aleksandro Lebedev legis la versaĵon de Tjutĉev "Люблю грозу в начале мая" en traduko de Vladimir Edelŝtejn. Sekvis komuna fotiĝo kaj poste festa manĝo kun vin- kaj tetrinkado.

Viktoro Aroloviĉ

“Kato de Schrödinger” pri Tago de Zamenhof

Dank’ al ĉeesto de ĵurnalisto el la scienc-populara (kaj tre populara!) reta revuo “Kato de Schrödinger”, kaj estiĝinta estimo de tiu ĵurnalisto al Esperanto pro konversacio kun Irina Gonĉarova, tie la 15-an de decembro aperis en la novaĵbendo artikolo pri Tago de Esperanta Libro – Tago de Zamenhof.

Vd.: <https://vk.com/ologysh> kaj <https://vk.com/@ologysh-den-esperanto-knigi-v-den-rozhdeniya-zamengofa>

Klubo de instruistoj

Esperanto-instruistoj de Rusio

Irina Gonĉarova

Naskiĝdato: **10.11.1951**

Jaro de esperantistiĝo: **1967**

Loĝloko: **urbo Odincovo, Moskva provinco, Rusio**

Profesio: **instruisto de Esperanto**

Instruista kvalifiko:

diplomo de Moskva ŝtata pedagogia instituto je la nomo de V. I. Lenin,

specialeco: instruisto pri la rusa lingvo kaj literaturo;

Dokumento de la Akademio internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, la

fako: neekzaktaj sciencoj;

sciencista grado: magistro pri humanistiko

La gepatra lingvo: **la rusa**

Studitaj fremdaj lingvoj: **la angla**

Preferataj aŭ plejofte aplikataj instrumentoj en la kursoj de Esperanto:

intensa, interaktiva, miksitaj

Esperantlingva kvalifiko: **C1 (Atesto de KER-ekzameno)**

Instruspertoj: **plej diversaj, inkluzive etatan laboron dum 12 jaroj kiel instruisto de Esperanto en Moskva aŭtomobilkonstrua instituto / Moskva ŝtata industria universitato**

Instruista kredo:

Instruado estas nenio, memlernado estas ĉio. Helpi memlernadon, firmigi motivadon.

Ŝatata aforismo: **Nur tiu ne eraras, kiu nenion faras.**

Finiĝas la eventoriĉa kaj neforgesebla 2018a jaro, en kiu la Estraro de REU proklamis konatan rusan esperantistinon Irina Gonĉarova “Eminenta Esperanto-instruisto de Rusio”. Por iĝi tiel apreze honorata persono sur la aparta faka kampo, oni devas havi rimarkindajn atingojn kaj meritojn, kiuj apenaŭ povus hazarde kaj neatendite sprosi el nenio. Multaj jaroj da senlaca laboro kaj fortoskua sed samtempe neeviteble ĝuiga agado markas la esperantistan kaj instruistan vivovoĵojn de Irina, pri kiu ŝi sincere kaj malkaŝe komunikas siajn rememorojn, ideojn kaj spertojn en la suba intervjuo. Por multaj instruantoj de Esperanto en nia lando la intervjuo malfermas sekretojn el la persona trezorujo de la koleginino, kies entuziasmo kaj instruista engaĝiteco estas estimindaj.

Vladimir Opletajev

1) Irina, vi iĝis Eminenta Esperanto-instruisto de Rusio pro gravaj atingoj kaj rezultodona agado en la pasinta lernoĵaro, sed kia estis por vi entute la jaro 2018 el la vidpunkto de multaj realigitaj planoj kaj projektoj? Ĉu ĝi ripetis la jam kutiman rutinon orbiton de via ampleksa kalendara taskaro aŭ ĝi estas la forfuĝanta jaro ankaŭ de novaj malkovroj kaj neordinaraj aktivajoj?

Foje mia vivo ŝajnas al mi rutina kaj senŝanĝa. Ĉio dum pluraj jaroj cirkulas en la sama ritmo, diktata de neeviteblaj ĉiujaraj taskoj: septembra varbado de lernontoj, aŭtuna kurso “Faru la Rondon!”, daŭriga kurso, prezentado de Esperanto dum aŭtunaj aliurbaj lingvaj festivaloj, preparo kaj okazigo de la Moskva lingva festivalo, vintra vojaĝo, januara varbado de lernontoj, vintra kurso “Faru la Rondon!”, senkrokodila apudmoskva renkontiĝo APERo, printempa daŭriga kurso, prezentado de Esperanto dum aliurbaj pretempaj lingvaj festivaloj, KER-ekzamenoj, maja krokodila renkontiĝo en Pljoso “VsPLESK”, prepariĝo al someraj Esperantaj eventoj kaj partopreno en tiuj — jen jam nova septembro, MASI-renkontiĝo “PostSomERe” — kaj denove... “turniĝas cirklo triviala”. Tiuj eventoj pasas sur la fono de verkado de artikoloj pri pasintaj eventoj, regula nutrado de interret-grupoj per raportoj pri okazintaj Esperantaj MASI-aktivadoj, kaj priesperanta korespondado, laboro pri la internacia projekto “Esperanta Poŝtkrucigo” kaj pri jutub-projekto “Esteranto: la unua kanalo”, kunordigo de la rutina vivo de Moskva Esperanto-Asocio MASI: paroligaj kunvenoj, Rondo de Legado...

Tamen, se pripensi, kredeble, ĉiujare okazas io nova. En tiu ĉi jaro, certe, novaĵoj estis...



Unue, enkadre de la vica, 12-a, APERo, februare 2018, pasis unuan fojon aktivul-maturiga trejnado de UEA “AMO-Seminario”. Estis granda defio por mi prepari kaj gvidi ĝin. Analizoj de ĝiaj sukcesoj kaj malfortaĵoj ne estas temo de tiu ĉi demando, mi nur diru, ke per si mem ĝi estis sukcesa, sed mi ne vidas fortojn en mi kaj ĉirkaŭ mi por realigi mian revon: fari ĝin regula landa aktivula trejnado “AMo.Ru”.

Due, unuan fojon en mia vivo mi multe kontribuis programon de ILEI-Kongreso, kiu pasis somere en Madrido. Mi havis du prelegojn (pri Esteranto-Poŝtkruciĝo kaj pri mia aŭtora kurso “Faru la Rondon!”), unu gravan elpaŝon enkadre de scienca simpozio (pri lingvaj festivaloj), sed plej gravas, ke mi, kune kun la patro de la lingvaj festivaloj usonano Denis Keefe, okazigis Lingvan Festivalon por ĉ. 300 partoprenintoj de la Kongreso, kun la celo komprenigi al esperantistoj ne nur teorie, sed ankaŭ praktike, kio estas klasikaj lingvaj festivaloj kaj kial ili gravas por popularigo de Esperanto.

Trie, ekde ĉi-septembro mi ĉesis instrui en ĉeestaj grupoj. Plej verŝajne, la vintra FaRo-50 estas la lasta. Mi komencis instrui per skajpo. Pesi plusojn kaj minusojn de tiuj ŝanĝoj estas aparta temo.

Kvare, mi faris novan provon ekaktivi en la urbo, kie mi loĝas. Ĉi-aŭtune mi okazigis en la urba biblioteko du ruslingvajn Rondojn de Legado, rakontante al la homoj inter cetera ankaŭ pri Esperanto, kaj unu prezentadon, la 15-an de decembro, kun la nomo: “Kio vi estas, Doktoro Esperanto? aŭ Kial lingvo de futuro bezonas literaturon”; la prezentadon antaŭis ekspozicio de Esperantaj libroj en la biblioteko.

Kvine, mia disĉiplo Aleksandr Basov en tiu ĉi jaro montris sin fervora kaj memstara esperantisto. Li ne nur — kiel ĉiam — ĉiel helpas min pri okazigo de MASI-projektoj, sed mem lanĉas siajn proprajn. Multgrade dank’al li ritme funkcias jutuba aktivado de MEA MASI “Esperanto: la unua kanalo”, kiun mi traktas la plej sukcesa kaj utila nia projekto. Indas substreki, ke ĝi rekte rilatas kaj al rekrutigo de novuloj, kaj al rivelado de ili, kaj al instruado: ĉiuj novaj esperantistoj, aperintaj antaŭ mi dum tiu ĉi jaro, asertas, ke regule spektas la kanalon, lernante kompreni Esperantan paroladon.

Mi preskaŭ forgesis... Ja en tiu ĉi jaro mi havis kroman taskon: en la REU-Estraro mi estis nomumita respondeculo pri regiona agado. Ve, ĉi-direkte estas preskaŭ nenio farita. Mi ne povas trovi en mia ritmo spacon por surporti kroman gravan taskon; por tio mi devus de io rifuzi — sed tion mi ne povas kaj ne deziras al mi permesi.

Kaj... Mi iĝis por tiu ĉi jaro Eminentata Esperanto-instruisto de Rusio. Kial ĝuste por tiu ĉi jaro, mi ne scias. Nenio speciala, normala labora jaro por mi.


2) *Profesie vi estas diplomita instruisto pri la rusa lingvo kaj literaturo, sed antaŭ multaj jaroj, definitive forlogita de Esperanto, vi ekinstruis ĝin. Ĉu vi povas nun nomi tiujn gravajn kialojn, kiuj instigis vin iĝi konvinkita instruistino de Esperanto?*

La plej grava kialo estis granda deziro feliĉigi homojn, entirinte ilin en Esperantujon. Mem ricevinte multe da vivpleniga sperto kaj grandiozan vastigon de mensa kaj scia horizontoj, mi certis, ke ĉiu homo, kiu enpaŝos nian liberigan amikan mondon, iĝos multe pli feliĉa, ol antaŭe.

Cetera, mi komencis instrui en rusiaj Esperantaj tendaroj kaj poste — koresponde. Mia unua ĉeesta kurso estis en 1979, tiam mi mem unuan fojon finstudis kun la gelernantoj la faman lernilon de Boris Kolker “Методические разработки по международному языку эсперанто”.

3) *Vi trapasis plurajn komplikajn kaj sukcesajn etapojn kaj travivis multajn neforgeseblajn eventojn en via longjara kariero de la Espranto-instruisto, kiu cetera devas ĉiam konscii mankon de ŝtata apogo kaj ĉerpi fortojn nur el la fonto de propra entuziasmo. Via opinie kiujn defiojn devas superi, aŭ devus esti preta akcepti tiujn, instruanto de Esperanto, kiu kutime agadas sur la movada kampo, ekster komfortaj kondiĉoj de oficiala lerneja lingvoinstruado?*

Nu, mi ne plendus pri manko de ŝtata apogo. En la benitaj 90-aj jaroj mi havis nekredoblan apogon, eble, ne de la ŝtato, sed de energiaj progresemaj entreprenistoj, celantaj inter cetera transformi klerig-sistemon de la ŝtato al komercaj entreprenoj. Tiam estis permesita ĉio. Tiam kelkaj moskvaj esperantistoj lanĉis la prosperegan kooperativon “KOPSO” por korespondata Esperanta instruado, ni havis 3000 gelernintojn de la tuta lando, ni ricevis salajron — kio permesis al mi adiaŭi ajnajn aliajn pormonajn laborojn kaj plene dediĉi min al Esperanto. En 1989 mi ricevis tioman honoraron pro verkita de mi kaj mia kolego Stanislav Koncebovskij “programita” lernilo, ke mi povis vojaĝi kontraŭ tiu mono al Brajtona UK-74, en Britio. Mi multe kunlaboris kun Akademio internacia de la Sciencoj San Marino, dank’al kio mi — tute por mi surprize — estis invitata instrui Esperanton etate en grandega aŭtomobilkonstrua instituto — kun 25 000 studentoj, por unu grupo de elektitoj Esperanto estis deviga studobjekto, kaj en tiu belega tempo komenciĝis EK MASI — Junulara Esperanto-Klubo de Moskva aŭtomobilkonstrua instituto, kiu nun estas konata kiel Moskva



Esperanto-Asocio MASI. Ĝi kunvenadis en mia propra kabineto! En tiu tempo la ŝtata altlernejo mendis al mi lernilon de Esperanto kaj Ministerio de klerigado de Rusia Federacio atribuis al ĝi la markon “Estas rekomendata kiel instruilo por superaj klerigejoj” kaj la vicrektoro pri scienco, eksa mia lernanto de Esperanto, persvadis min doktoriĝi ĉe MASI (kion mi rifuzis), tiam mi iĝis magistro ĉe AIS kaj regule vojaĝis — sola aŭ kun miaj brilaj studentoj — al ties sidejo en San Marino por sesioj... Tiam mi laboris en ankoraŭ du grandaj moskvaj universitatoj, en naskiĝantaj komercaj fakultatoj, kie oni pagis mian laboron pli bone, ol en la ŝtata MASI... Entuziasma instruado, gejunuloj, lanĉoj de esperantaj festivaloj kaj eventoj, kunaj vojaĝoj tra Eŭropo... Benitaj naŭdekaj!!!

Do, tiam mi estis tre entuziasma, jes, kaj tio estis facila — ĉar mia entuziasmo estis subtenata ĉiel — kaj de ĉiuj universitataj rektoroj (kiuj dum mia laboro estis tri diversaj homoj!), kaj de amataj studentoj, kaj de nia bolanta Esperanta vivo, kaj de perlaborata mono... Sed la tempoj ŝanĝiĝas... Nun mi aspiras kaj atendas la samajn fontojn de entuziasmo, ĉefe — de Esperantemaj gelnantoj. Kio ankoraŭ povas inspiri tiel efike?..

Kiujn defiojn devus esti preta akcepti la nuna instruanto? Nu, prepariĝu, gekaraj, mi diros nenion inspirigan! Nun instruanto de Esperanto devas esti preta al tio, ke liaj penoj estos absolute vanaj. Li devas esti preta, ke al lia prelego venos neniu, kaj al lia kurso, por kiu aliĝis dek homoj, venos neniu, ke veno de eĉ 10 homoj al la unua leciono ne signifas, ke al la dua venos la samaj kaj ke al la kursofino restos almenaŭ unu. La instruanto devas esti preta al tio, ke kursfinintoj, eĉ plej sukcesaj, neniam plu venos por revidi lin, des malpli — por helpi lin ion organizi, ion kunfari por Esperanto, ke ĉiuj penoj allogi iamajn lernintojn per kunvojaĝoj, plia lingvostudo, lingva beleco aŭ movadaj perspektivoj impresos neniu.

Nuna instruisto devas esti preta labori sen ricevi rezultojn, labori nur esperante je hazarda, bonŝanca miraklo. Tiu miraklo estas: ekhavi samideanon. Samkiel poeto, laŭ Majakovskij, devis prilabori milojn da tunoj de vorta erco por trovi la solan ĝustan vorton, samtiel devas labori nun instruanto de Esperanto por renkonti veran estontan esperantiston.

4) *Via aŭtora kurso “Faru la rondon!” (“FaRo”) pasis vintre de 2018 la jubilean nombron 50! Centojn da kursanoj per “FaRo” vi venigis al Esperanto. Multaj el viaj kursfinintoj iĝis aktivaj esperantistoj, multaj daŭre kontaktas vin. Sed kiujn elementojn de via propra kurso vi mem ŝatas? Temas pri elementoj, metodaj aliroj, metodikaj kaj teknologiaj eroj, kiujn vi estis kolektanta dum multaj jaroj kaj el kiuj formiĝis via propra instrusistemo.*

Malfacila demando... Ĝenerale, mi tre ŝatas instrui ajnmetode. Kiam mi maldungiĝis de la universitato, mi aplikis nur FaRon, ĉar mi multfoje konvinkiĝis, ke por mia celgrupo la kurso estas plej efika. Unu el celoj de la kurso estas teni homojn, ĉiam motivi ilian deziron viziti ĝin. Ĉefa motivo estas, certe, deziro de la lernantoj. Se ili ne dezirus, ili ne pagus la kurson. Pago iĝas per si mem bona motivo finstudi. Sed se ŝrumpas entuziasmo (ekzemple, pro ne sufiĉa sukceso), neniuj pagoj retenos — homo foriras. Do, ĉiu leciono per si mem devas esti allogaĵo. Tial ĉiu leciono enhavas ion freŝan, iujn surprizojn. Kaj nepre — ion stimulan por amikiĝi, helpi unu al la alia. Ja ankaŭ agrabla kolektivo estas stimulo por resti. Mi ŝatas ĉiujn elementojn, absolute ĉiujn. Se mi ne ŝatus ion, mi nepre anstataŭigus tion per aliaj elementoj, provus ion novan. En la kurso estas nur tio, kio efikas — kaj kio plaĉas al mi.

5) *La praktika agado ĉiam pruvus, ke baznivela instruado de Esperanto al kursanoj estas nur unua, fojfoje tre plaĉa etapo, kiun sekvas tre komplika rekrutiga laboro, kiu eltordas nervojn, forvoras fortojn kaj tempon de grupestro kaj kiu celas fine enmovadigon de novaj esperantistoj. Ĉe ĉi tiu dua etapo plej ofte fiaskas movadaj aspiroj de eĉ tre lertaj kursgvidantoj. Kiujn spertojn vi havas por laŭeble pli-malpli reale protekti, puŝi kaj lingve progresigi, efike patroni kursfinintojn?*

Mi jam menciis, ke dum la unua etapo mi penas krei kolektivon, kaj foje mi sukcesas. Pri kio mi rajtas fieri estas ke plej ofte mi tute ne perdas homojn dum la kurso — kiom da komencis, tiom da finas. La kialojn mi jam diris pli supre. Kio pli? La homoj ĉiam devas vidi perspektivon, la sekvan paŝon. En nia kazo estas: se vi finos la bazan kurson (FaRo), vi rajtos partopreni la daŭrigan, poste — KER-ekzamenon aŭ APERon (depende de la sezono), poste — vi ja eniros organizan teamon de la Lingva Festivalo? Vi ja iros kun ni al Konversacia Rondo? Al Rondo de Legado? Aliurben al lingva festivalo? Al Jekaterinburga Lingva Trejnado? Al UK? Se jes, ni kun vi devas ankoraŭ iom lerni... Kaj prepari tion kaj tion...

La plej grava tasko estas venigi homojn al la daŭriga kurso. Tion helpas iliaj sukcesoj — kaj grandaj, kaj etaj — post FaRo. Ja FaRo estas pure parola kurso. Homoj jam tre multon povas diri, tamen imagon pri la gramatiko havas svagan (ĉefe ĉar ne diligente preparas hejmajn gramatikajn taskojn), sed ili jam ekhavis pri ĝi scivolemon. Daŭriga kurso estas pure gramatika, ĝi pasas en la rusa lingvo (kio, cetere, ofte ĉagrenas homojn, sed aliel ne eblas). Dum la gramatika kurso mi havas eblojn pli detale rakonti pri sekvaj paŝoj de nia komuna (aŭ ilia aparta) Esperanta vivo.

6) *Spertaj instruistoj neniam tenas fermita sian metodikan trezorujon. Vi verkis kelkajn lernolibrojn de Esperanto. Vi multe kaj sukcese laboras en la junulara medio kaj ofte komunikas al kolegoj viajn spertojn dum seminarioj, kongresoj, fakaj kunvenoj. Se malpaki vian instruistan bagaĝon, kion aparte utilan kaj interesan oni povas trovi en ĝi?*

“Faru la Rondon!” Ĝi estas trezoro en mia trezorejo.

7) *En Rusio multas spertaj instruantoj de Esperanto: iuj estas diplomitaj profesiaj lingvoinstruistoj, iuj peras Esperanton kiel amatoraj instruantoj. Ankaŭ novaj junaj kursgvidantoj kuraĝe alfrontas la instrukampon, dezirante fosi sian propran sulkon. Sed ankaŭ instruistoj bezonas idealon. Kiujn profesiajn ecojn devus laŭ via opinio posedi modela instruisto de Esperanto? Kion vi ŝatus sojle de la Nova jaro deziri al kolegoj-instruistoj en multaj urboj de nia vasta lando?*

Verŝajne, vi atendas de mi, ke mi diros: moderna instruisto devas mem perfekte posedi la lingvon. Ne, mi tion ne diros. Perfekte posedu la lingvon la lernantoj, kiujn vi sukcesis interesigi pri la gramatiko, prononcado ktp, pri legado de libroj en Esperanto, pri komprenado kaj memfarado de prelegoj dum APERo ks. Via rolo estas inspiri ilin por la perfekta posedo. Modela instruisto devas, laborante kun grupo, atenti kaj kompreni bezonojn de ĉiu grupano aparte. Ĉiu homo bezonas sian aliron. Ne rapidu kun verdiktoj. Foje viaj amataj “steloj” lasas vin post tri lecionoj, sed “malrapidpensantoj” restos kun vi por jaroj — kaj dum jaroj ekposedos la lingvon pli bone, ol vi povus supozi. Sciu taski homojn. Ju pli da devoj por iu komuna afero via lernanto plenumos, des pli li sentos la aferon sia, des pli longe li restos kun vi.

Sciu kaj provu multajn metodojn, sed ellaboru la vian — kaj restu fidela al ĝi. Ricevu plezuron de instuado, ĝuu sukcesojn de viaj lernantoj. Tamen... ne esperu tro.

Karaj kolegoj! Kion deziri al vi, al ni? Neniame seniluziigu!!! Ni semu kaj semu... Kaj aperu la verdaj ĝermoj!
Feliĉan Novan Jaron!

Katalogo de rusiaj Esperanto-lerniloj, verkitaj, eldonitaj, enretigitaj en RSFSR kaj Rusio ekde 1957

La dua parto, la unua parto aperis en BdR n-ro 99

№	Aŭtoro	Titolo	Eldonejo, urbo	Eldon- jaro	Eldon- kvanto	Nombro de paĝoj	Mallonga referenca noto	Bitversio, reta ligilo
13	Stanislav Koncebov- skij, Irina Gonĉarova	«Эсперанто. Программированное учебное пособие. Часть 1. Элементарный курс. Уроки 1-12.»	Кооператив «Копсо», Москва	1990	1000	234	Novtipa lernilo (ideo de Stanislav Koncebovskij), konstruita laŭ sistemo de memkontrolo. En amika konversacia stilo estas klarigo de gramatikaj reguloj, tion sekvas ekzercoj por elekti ĝustan respondon el du aŭ kelkaj variantoj. La elektita varianto gvidas al hazarda paĝo de la lernilo. Ĉe ĝusta elekto oni rajtas ricevi novan materialon en menciita paĝo, ĉe la malĝusta oni devas fari aliajn samtipajn ekzercojn ĝis veno al senerara rezulto.	
14	И. Г. Гончарова (Ирина Германовна Гончарова)	«Эсперанто для студентов и не только. Учебное пособие»	Государственный комитет РФ по высшему образованию. Московский автомобильно-строительный институт. Межгосударственный университет «Рутения». Ротапринт МАСИ (ВТУЗ-ЗИЛ), Москва	1995	250	132	La lecionoj estas aranĝitaj laŭ la lernilo de Zabreba metodo: teksto kun surmargenaj novaj vortoj, ekzercoj A, B, C – de plej malfacila al plej facila, sekvas D – demandaro por aktuala konversacio kun MASI-studentoj. Diversaj aldonaj taskoj ĉe ĉiu leciono, inkluzive temojn por konversacioj. Fine de la lernilo – riĉa gramatika konsultmaterialo, Esperanto-rusa kaj rusa-Esperanto-vortaroj kun mencio de leciono, kie unuan fojon aperis la vorto.	
15	Гончарова И. Г. (Ирина Германовна Гончарова)	«Эсперанто для студентов и не только» Учебное пособие. — Издание второе, исправленное и дополненное. Гриф: Рекомендовано Министерством образования Российской	РИЦ МГИУ, Москва	1999	800	132	La lecionoj estas aranĝitaj laŭ la lernilo de Zabreba metodo: teksto kun surmargenaj novaj vortoj, ekzercoj A, B, C – de plej malfacila al plej facila, sekvas D – demandaro por aktuala konversacio kun MASI-studentoj.	

		Федерации в качестве учебного пособия для студентов высших учебных заведений.					Diversaj aldonaj taskoj ĉe ĉiu leciono, inkluzive temojn por konversacioj. Fine de la lernilo – riĉa gramatika konsultmaterialo, Esperanto-rusa kaj rusa-Esperanto-vortaroj kun mencio de leciono, kie unuan fojon aperis la vorto.	
16	Ирина Германовна Гончарова	«Базовый курс эсперанто. 12 уроков» —1989-1990	Журнал «Трезвость и культура», 1989 - №5-12 1990 - №1 (la 12-a leciono ne aperis)	1989-1990		Unu teksta kolumo Sur unu paĝo	Baza gramatika kurso kun ekzercoj.	
17	И.Г. Гончарова (Ирина Германовна Гончарова)	«Эсперанто для международного общения». Учебное пособие для студентов заочной (дистанционной) формы обучения. Гриф: Рекомендовано Министерством образования Российской Федерации в качестве учебного пособия для студентов высших учебных заведений.	Международный институт «ИНФО-Рутения», Москва	2004	500	132	13-leciona baza kurso de Esperanto en la rusa lingvo kun gramatika suplemento, rusa – Esperanta kaj Esperanto – rusa vortaretoj. La lernilo estas destinita por koresponda kaj memstara lernado.	
18	И. Г. Гончарова	«Язык эсперанто за один месяц. Самоучитель разговорного языка»	Издательство АСТ-«Восток-Запад», (серия "Реальные самоучители иностранных языков"), Москва	2006	2000	158	Faciligita versio de «Эсперанто для студентов и не только», surbaze de novaj dialogaj tekstoj, ne ligitaj al MASI-realajoj.	
19	Клод Пирон, Ирина Гончарова	«Учебник языка эсперанто. Начальный курс»	Издательство АСТ-«Восток-Запад", Москва	2007	2000	186	Gramatikaj komentoj kaj ekzercoj al ĉiuj 25 ĉapitroj de la instrua romaneto “Gerda malaperis”, verkita de Claude Piron. Laŭleciona 4-lingva vortaro fare de Kirill Grustnjov.	
20	Ирина Германовна Гончарова	Курс эсперанто	Youtube, канал MEA MASI “Esperanto: первый канал” https://www.youtube.com/watch?v=jqHVSLqIh8&t=1s	2015 - daŭrigota	-		Ok 5-10-minutaj lecionoj por komencantoj. La kurso ne estas finfarita.	

1) Por ĉi tiu parto de la katalogo (13 – 20) kunlaboris Irina Gonĉarova, Vladimir Opletajev, Nikolaj Gudskov.

El la vivo de jekaterinburgaj esperantistoj

Mi kolektis kelkajn priskribindajn novaĵojn el la vivo de jekaterinburgaj esperantistoj kaj ŝatus raportoj pri ili, des pli ke mi faris tion antaŭlonge: ŝajnas, ke lastfoje ĉi-septembre, post la vizito de la franca esperantistino al Jekaterinburgo.

Unufoje en ĉiu el aŭtunaj monatoj niaj negrandaj esperantistaj grupetoj de la ŝatantoj de klasika muziko kune vizitis en Jelcin – centro piankoncertojn el aŭtuna programo de koncertoj de la premiitoj dum la internacia piankonkurso memore al Vera Lotar – Ŝevĉenko, kiu okazas en Jekaterinburgo unufoje en du jaroj. Tiel, septembre ni ĝuis la koncerton de Jevgenij Miĥajlov (el Kazano), oktobre – de Jelena Nefedova (el Italio) kaj novembre – de Aleksej Vaker (kiu naskiĝis en Tomsko, sed nun loĝas en Moskvo). Dum tiuj koncertoj ni plezure ĝuis belegan muzikon de vaste konataj en muzika mondo komponistoj: Mozart, Schubert, Schuman, Chopin, Franck, Brahms, Ravel, Raĥmaninov, Skrjabin. Foje ni eĉ fotiĝis kune dum la paŭzo kaj vi povos vidi niajn fotojn ene de la moderna urba centro kaj ankaŭ antaŭ la aŭto (nigra “Ĉajka”), kiu iam apartenis al Boris Jelcin, dum lia laboro kaj loĝado en Jekaterinburgo :)

La alia aparte priskribinda nia aktivado dum tiu ĉi aŭtuno, kiu precipe ĝojigas min persone, estas tre bona kunagado kun la muzeo de historio de Jekaterinburgo – unu el ĉefaj urbaj muzeoj, situanta centre de la urbo. Jam komence de la septembro mi estis invitita de

muzeistoj viziti ilin kaj havis bonŝancon longe interparoli kun ili, respondante al multaj iliaj demandoj pri Esperanto. Vidante ilian sinceran scivolemon, mi senhaste respondis al ĉiuj demandoj kaj rezulte ni interkonsentis pri la duonjara kunlaboro kaj planis eventualajn aranĝojn, en kiuj ni povos realigi nian kunlaboron. Tiel, jam dum la solena malfermo de la nova muzea ekspozicio meze de septembro, estis prezentita ankaŭ montrofenestro kun la materialoj pri Esperanto, kaj mi ĉeestis tiun malfermon laŭ la invito de la muzeo. En la novaĵoj de la loka televidkanalo tiuvespere estis informa ero pri tiu malfermo de la ekspozicio kaj oni montris ankaŭ la montrofenestron pri Esperanto. Pli poste ni kunestis en la muzeo dum la vizito de Fransoazo en Jekaterinburgo; krome komence de novembro mi du-trifoje partoprenis la ekskursojn por la urbaj lernejoj dum iliaj aŭtunaj ferioj kaj povis iom aldone rakonti al ili pri la lingvo.



Dimanĉe, la 18-n de novembro okazis Muzea Nokto dediĉe al la historia naskiĝtago de la urbo, kaj muzeistoj invitis nin, esperantistojn, fari unuhoran prezentadon de Esperanto kadre de la programo de tiu festa vespero. Dum unu horo, de 20.00 – 21.00, grupo de niaj aktivuloj rakontis pri Esperanto, montris videofilmojn kaj prezentis belecon de la lingvo, deklamante rusajn klasikajn poemojn en la rusa kaj paralele en Esperanto, montris surekrane muzikanimacian videon pri la kanto “33 bovinoj” kaj eĉ mem kantis, akompane de gitaro, la kanton de Vizbor “Mia amatin” en Esperanto. Mi volas substreki, ke por la unua fojo rakontis pri Esperanto kaj komentis la prezentaĵon Sergej Kumkov, kiu aliĝis al jekaterinburga esperantistaro antaŭnelonge. Sed havante grandan sperton fari publikajn prelegojn, estante instruisto en la universitato, Sergej tre sukcese plenumis la taskon de la preleganto. Mi ŝatus kore danki lin, Lena Uspenskaja, kiu kantis kune kun ni, kaj ĉiujn jekaterinburgajn esperantistojn, kiuj subtenis la aranĝon ĉeeste. Mi tre ĝojas, ke al la aŭskultantoj plaĉis nia prezentado kaj ili sincere aplaudis kaj dankis nin, ankaŭ faris demandojn pri Esperanto kaj ĝenerale longe ne volis disiri, kvankam ili povis jam viziti la aliajn programerojn de la muzea vespero. Kelkajn fotojn de tiu ĉi vespero vi ankaŭ trovos ĉi tie. Kaj la plej ĝojiga estas la fakto, ke per tio nia kunlaboro kun la muzeo ne finiĝis kaj mi esperas, ke baldaŭ mi povos rakonti al vi pri aliaj interesaj eventoj tie, realigitaj kun la partopreno de esperantistoj.

Raja Kudrjavceva.

Rezultoj de la Ural-Siberia regiona aktivaĵo “Libroj, kiujn ni legas”

Verkado, same kiel parolado, apartenas al aktivaj formoj de lingvouzado. Tial la pasinta Ural-Siberia regiona reta aktivaĵo “Libroj, kiujn ni legas” celis unuavice “inspiri libroŝatantojn al legado de libroj en Esperanto, popularigi interesajn librojn, entuziasmigi legantojn por verkado de komentarioj kaj recenzoj pri legataj aŭ legitaj verkoj”. Nemaĝgrava fakto estas, ke ni dediĉis ĝin al la 159-jara naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof kaj al la Tago de la Esperanta literaturo. Dum kvin semajnoj la projekton partoprenis legemaj kaj verkemaj esperantistoj el 7 urboj de nia regiono kaj de aliaj partoj de Rusio, 13 personoj prezentis en la Ural-Siberia dissendolisto entute 17 recenzojn kaj komentariojn, kiujn vikle sekvis multaj interesaj replikoj kaj komentoj, diskutoj:

Jekaterinburgo – 6 recenzoj de 4 aŭtoroj;

Niĵnij-Tagilo – 4 recenzoj de 4 aŭtoroj;

Sankt-Peterburgo – 2 recenzoj de unu aŭtoro;

Surguto – 2 recenzoj de unu aŭtoro;

Glazovo – 1 recenzo de unu aŭtoro;

Tobolsko – 1 recenzo de unu aŭtoro;

Volgogrado – 1 recenzo de unu aŭtoro.

Ni prezentas la verkintojn de afiŝitaj recenzoj kaj komentarioj:

Valerij Borodin (Niĵnij-Tagilo);

Dilara Gadirova (Tobolsko);
 Lidija Jerofejeva (Niĵnij-Tagilo);
 Raja Kudrjavceva (Jekaterinburgo);
 Sergej Kumkov (Jekaterinburgo);
 Larisa Kuzjmenko (Niĵnij-Tagilo)
 Sergej Lokis (Jekaterinburgo)
 Valerij Malcev (Niĵnij-Tagilo);
 Vera Matvejeva (Jekaterinburgo)
 Vladimir Opletajev (Surguto);
 Anatolo Sidorov (Sankt-Peterburgo);
 Valentina Spicina (Volgogrado);
 Olga Ŝilajeva (Glazovo).

La prezentitaj recenzoj traktis 13 originale verkitajn kaj 4 tradukitajn librojn. Inter la verkistoj pli legataj kaj diskutataj estis István Nemere (Hungario), Stellan Engholm (Svedio), Trevor Steele (Aŭstralio), Claude Piron (Svislando), J. R. R. Tolkien (Britio). La ĉefgvidanto de la aktivaĵo Raja Kudrjavceva detale kaj dokte komentis ĉiun aperigatan recenzon kaj kompletigis ĝin per interesaj faktoj kaj detaloj, kio sendube riĉigis la projekton kaj altigis ĝian nivelon.

Ĉiu partoprenanto de la librorecenza maratono ricevos diplomon, en kies teksto i.a. estas emfazate, ke li / ŝi “aktive pledis por la popularigo de librolegado en Esperanto”.

La gvidantoj de la projekto elektis 12 recenzojn, kiuj estos afiŝitaj en la paĝaro “Ural-Siberia esperantista movado”, 7 el ili estos premiitaj per libropremioj.

La gvidgrupo de la reta aktivaĵo „Libroj, kiujn ni legas“ dankas ĉiujn verkintojn de recenzoj kaj komentarioj, komentintojn kaj diskutintojn pro la aktiva rilato al la librolegado en Esperanto kaj gratulas ĉiujn ŝatantojn de la Esperanta literaturo okaze de la Zamenhof-Tago. Feliĉan Novan jaron al ĉiuj, en kiu vin ĝojigu ankaŭ interesaj kaj saĝaj libroj en Esperanto!

*Gvidanta teamo,
 15. decembro 2018*



Libroj, kiujn ni legas

Diplomo

**S-ro Sergej Kumkov
 (Jekaterinburgo)
 aktive partoprenis en
 la Urala regiona esperantista
 reta projekto
 “Libroj, kiujn ni legas”
 (25. oktobro – 10. decembro
 2018) omaĝe al la
 159-a naskiĝdatreveno
 de Ludoviko Zamenhof kaj per
 la recenzo pri la libro
 “La hobito” de J. R. R. Tolkien
 atentinde pledis
 por la popularigo
 de librolegado en Esperanto.**

Kunordiganto de la projekto

Raja
 Kudrjavceva

Jekaterinburgo,
 15. decembro 2018



*Raja
 Kudrjavceva*

Lingvaj festivaloj

La 13-a Moskva Lingva Festivalo: novaj perspektivoj

La 13-a Moskva Lingva Festivalo, ĉiujare organizata de Moskva Esperanto-Asocio MASI, pasis la 2-an de decembro 2018, dimanĉe, en la fakultato pri socisciencaj de Naci-esplora universitato “Supera lernejo pri ekonomio” («Высшая школа экономики»). La eminenta klerigejo akceptas nin jam la duan fojon: en 2012 ĉi tie pasis la 7-a MLF.



La honoron ni danku al la vicdekano de la fakultato pri socisciencaj Vladimir V. Fajer — la malnova amiko de niaj festivaloj. Li salutis la festivalon dum la Solena Malfermo kaj restis kun ni la tutan tagon, kontribuante la programon per la prezento de la etruska lingvo, mastrumadon per propramane transportado de boligilego el manĝejo al “Instruista teejo” kaj la Malfermon, invitante la festivalon al la fakultato por la sekvaj jaroj. Grandan organizan laboron faris la vicdirektoro de la festivalo Anton Somin — instruisto kaj scienca laboranto de la fakultato kaj denaska festivalano (de la festivala naskiĝo :). Estas granda tento nomi ĉiujn 28 membrojn de la agorde kaj sindone laboranta organiza teamo, aŭ almenaŭ 17 esperantistojn (ĉiuj – MASianoj) el tiuj, sed mi riveligu nur Aleksandr Lebedev, mia ĉiutaga akurata kaj atenta kunlaboranto pri la festivala paĝaro <http://www.lingvafestivalo.info/> kaj kunordiganto de la dekhoma teamo, prizorganta kontribuantojn de la programo dum preparperiodo kaj ene de la festivalo.

Gastoj de la festivalo — la organizantoj de la multe pli juna simila evento en la urala urbo Ĉelabinsko, venintaj al Moskvo por preni sperton de la ĉefurbanoj, dum unuaj minutoj estis surprizitaj pro ĉiutageco ĉe la akcepto kaj afereca etoso en la vestiblo — sen ajnaj distraĵoj-amuzaĵoj, ankaŭ dum la Solena Malfermo — sen ajna patoso kaj bravuraĵoj, sed dum la Parado de Prezentoj estis forte impresitaj pro abundo de interesaj proponoj kaj konfuzitaj pro malfacila elekto: kiun programeron viziti, ja necesas elekti nur 7 el 120 proponoj... “Certe, nia festivalo estas pli bravura, sed la moskva — multe pli inteligenta kaj science pli kvalita, — diris poste la gastoj. — Estas kion lerni. Ni nepre revenos sekvan jaron”.



Sep 40-minutaj trakoj de la programo disponigis al la publiko kelkajn temarojn en proksimume tia proporcio: 60 bazaj lecionoj pri lingvoj, 30 lingvistikaj prelegoj, 20 seminarioj pri lernado kaj uzado de lingvoj; funkciis Infana Spaco kun aparta programo kaj kultur-lingvaj distraĵoj de "Alia formato".

Esperanto estis prezentita abunde: du gramatikaj lecionoj, unu prelego, unu seminario kaj tri programeroj enkadre de la Infana Spaco. Dum 40 minutoj funkciis Esperanta Gastejo, kie kunvenis esperantistoj kaj gastoj, emaj konatiĝi kun vivaj “lingvoportantoj”.

La programon de la festivalo kontribuis ĉ. 110 homoj, inter kiuj 16 esperantistoj. Ni listigu ilin (alfabetorde) kaj iliajn kontribuojn, celante liveri iom da pli konkreta informo pri la festivalaj programeroj:

1. Alan Bigulov (membro de REU, u. Vladikavkazo) — prelego "10 lingvoj dum 1000 tagoj — ĉu eblas?"
2. Alisa Zingerman (membro de MEA MASI) — prezentado de la hebrea lingvo
3. Anastasija Golc (MEA MASI) — prezentado de la finna lingvo, gvidado de la Solena Malfermo, preparado de programtabelo
4. Anastasija Lbova (MEA MASI) — prezentado de la itala kaj indonezia lingvoj, vortludado "Komparu la italan kaj la hispanan" kun infanoj en la Infana Spaco
5. Artjom Fedorinĉik (u. Kievo / u. Ĉeboksari) — prezentado de la ĉuvaŝa kaj kartvela lingvoj, prelego "Kiel ni parolas pri la spaco"
6. German Dudĉenko (Sankt-Peterburgo) — prezentado de la ĉina lingvo kaj seminario "Kiel estas faritaj ĉinaj kaj japanaj vortaroj".
7. Elena Berejkova (MEA MASI) — prezentado de la eŭska lingvo kaj lecionetoj "Pri kio okupiĝas filologoj?" kaj "Pri kio okupiĝas lingvistoj?" en la Infana Spaco.
8. Miĥail Ĥaminskij (MEA MASI) — prezentado de la belorusa, katalana kaj ukraina lingvoj
9. Ilja Gimon (MEA MASI) — prelego "Nomoj de planedoj"
10. Irina Gonĉarova (MEA MASI, REU) — seminario "La tuta Esperanto en du strofoj", praktikaj okupoj en la Infana Spaco ("Saluton el Moskvo! Poŝtkruĉigo nun kaj ĉi tie!") kaj kunordigado de Esperanta Gastejo.
11. Luis Fader (Argentino / Moskvo) — prelego "Esperanto: ĉu utopio aŭ lingvo de la estonteco?"
12. Natalja Laziĉ (MEA MASI) — prezentado de la serba lingvo kaj kvizo en la Infana Spaco ("Helpu al la herooj de fabeloj").
13. Pjotr Fedosov (MEA MASI) — prezentado de Esperanto kaj scenigo de rusa popola fabelo "Kabaneto" en Esperanto en la Infana Spaco



14. Svetlana Smetanina (REU) — prezentado de Esperanto
15. Viktorija Prijmak (MEA MASI) — manlaboroj kaj anglalingva kantado de porinfanaj kanzonetoj kun plej junaj infanoj en la Infana Spaco
16. Kalle Kniivilä — prezentado de la sveda lingvo

Kompreneble, pri Esperanto estis multaj paroloj kaj dum la malfermo, kaj dum la fermo de la festivalo, do, neniu el 800 partoprenintoj havis ŝancon foriri sen eksenti, ke Esperanto ĉi tie estas la plej hejmeca lingvo.

La festivalo pasis bonege — kiel ĉiam, kvankam ĉiam estas ankaŭ io nova... Kio ĉi-foje? Ni rigardu perspektivon. Dum tiu ĉi festivalo eliris el la ombro kelkaj antaŭe pasivaj observantoj — laborantoj de la fama moskva Biblioteko de fremdlingva literaturo kaj la moda sciencpopulara ĵurnalo “Kato de Ŝrjodinger”. Ambaŭ proponis al ni kunlaboron. Kaj tiu jam startis. Novaj partneroj liveras novajn eblojn ankaŭ por Esperanto. La 15-an de decembro en la interretaj resursoj de la ĵurnalo aperis granda artikolo okaze de Zamenhof-Tago kaj la biblioteko invitis min ripeti mian seminarion pri Esperanto. Kun ambaŭ organizaĵoj jam estas traktataj kelkaj ideoj de kunagado.

Pliajn detalojn pri la MLF-13 trovu en la festivala paĝaro: <http://www.lingvafestivalo.info/>, ankaŭ en la VK-grupo <https://vk.com/mlfest>

*Irina Gonĉarova,
direktoro de MLF
kunordiganto de MEA MASI*

Ni en ekstera medio

UEA reprezentita en Moskvo

Franĉois Lo Jacomo, Rakoen Maertens kaj la redaktoroj de la revuo Esperanto Anna Striganova kaj Dima Ŝevĉenko estis reprezentantoj de UEA dum la 10a Internacia forumo de neregistaraj organizaĵoj, kiuj partneras kun Unesko. La forumo okazis la 26an kaj la 27an de novembro en la Moskva hotelo RitzCarlton, kiu situas apud la Moskva Kremlo kaj la Ŝtata Dumo (parlamentejo). La temo de la forumo estis “Scienco por komuna bono de la homaro”. Ĝin organizis Unesko, Rusia Akademio de Sciencoj kaj Rusia Pacfonduso. La forumon malfermis la ministro pri eksterlandaj aferoj Sergej Lavrov.



Anna Striganova.

La Ondo de Esperanto Esperanto, n-ro 290, decembro 2018, p.12

Pri Esperanto en konferenco pri amaskomunikiloj

09.11 ni partoprenis en la 9-a Tutrusia scienc-praktika konferenco "Amasaj komunikiloj en multpolusa mondo: problemoj kaj perspektivoj", kiu okazis en Moskvo, Rusio. Tie ni prelegis pri "Literatura recenzado en la revuo "Esperanto"" (Anna), "Unesko-Kuriero en Esperanto" (Dima). Fine de la novembro ambaŭ niaj prelegoj aperos paperforme en la libro de la konferenco.

Temoj pri Esperanto vekas intereson ĉe la partoprenantoj: studentoj, profesoroj, sciencistoj ktp. Oni sufiĉe serioze akceptas ĝin.

Pasintjare ni ankaŭ partoprenis en tiu ĉi konferenco (la 8-a). Tiam ni rakontis pri la sperto de la redaktado de "Esperanto" kaj pri Esperanto en interreto.

Kelkaj fotoj estas Fejsbuke en niaj paĝoj.

Dima Ŝevĉenko, Anna Striganova

Renkontiĝoj

MER-15

La 9-an de decembro, okazis la 15-a Moskva Esperanto-Renkontiĝo (MER-15). Partoprenis 20 personoj el Rusio kaj Ukrainio - ĉefe spertaj esperantistoj kaj konstantaj MER-anoj. La renkontiĝo daŭris ĉ. 10 horojn.

La aranĝo estis Zamenhof-festa. Speciala gasto Mikaelo Bronŝtejn koncertis, prezentis sian novan poemaron, kiu ĵus aperis ĉe eldonejo "Impeto", kaj prelegis rilate ĉefan temon de la renkontiĝo.

Nikolao Gudskov detale prezentis la libron "Antaŭ unu jarcento" (Red. Javier Alcalde kaj José Salguero). Aleksej Nistratov voĉlegis sian rakonton "Hundaj sonĝoj". Taŭriono Smykov faris interesan rakonton pri la programaro, kiun li uzas. Pavel Konakov faris prezenton pri la ekologia turismo en lia regiono. Okazis ankaŭ koncerto de Mikaelo Povorin kaj la komuna kantado.

Tradicie okazis abunda manĝado, organizita de la mastroj.



Novaj libroj

Mikaelo Bronŝtejn. Viv-teatro

Mikaelo Bronŝtejn prezentas novan, la sesan kolekton de originalaj poemoj en Esperanto (krom tio, estas eldonitaj du kolektoj de liaj rusaj poeziaĵoj). Ĝi nomiĝas "Viv-teatro" kaj konsistas el ses partoj, ĉiu dediĉita al aparta temo. La libron formis elektitaj verkoj, kreitaj inter 2014 kaj 2018, multaj el kiuj estis pli frue publikigitaj en diversaj periodaĵoj.

Frandu la novan donacon de nia plej eminenta verkisto!

Pri la akiro de la libro turnu vin al la eldonistoj: <http://lernolibro.ru>

Mikaelo Bronŝtejn. Viv-teatro. Originalaj poemoj. Moskvo, Impeto, 2018. 116 p. ISBN 978-5-7161-0303-0

Apud Rusio


Vigle paŝas antaŭen

Ĉi-somere tuj post la oficiala registriĝo de la landa E-Asocio (UzEA) al nia lando, Uzbekio, venis sperta E-instruisto, fama fakulo en Esperantujo s-ino Tatjana G. Loskutova el Rusio. Unue, dum unu semajno ŝi instruis en Samarkando kaj poste venis al la ĉefurbo, Taŝkento. Post la registriĝo de la Asocio por mi estis iom malfacile tuj trovi klasĉambron por instruado. Sed mi sukcesis trovi ĝin en la urba junulara centro. Kutime somero estas ripozperiodo por studentoj kaj lernantoj kaj ankaŭ por aliaj homoj. Pro tio iom estis malfacile organizi grupon. Malgraŭ tio troviĝis kelkaj dezirantoj por lerni la internacian lingvon. Nia estimata gasto Tatjana L. plezure komencis instrui. Estis rimarkeble, ke tuj ekplaĉis al ĉiuj gelernantoj ŝia nova facila, ege interesa kaj speciale preparita lernoprogramo por uzbekaj lernantoj. Ĉiuj ĉeestintoj tuj ekamis ŝin pro ŝia afableco kaj agrabla studmaniero. Post la longa paŭzo en nia landa E-movado, kiun kaŭzis la forpaso de la fama E-aktivulo Eŭgeno S.Perevertajlo, tiu instruado estis granda evento por miaj samlandanoj.

Dum 10 tagoj, kiujn mi pasigis kun Tatjana, ankaŭ mi mem sentis min en vera Esperantujo, ĉar mi estis ege E-sopirinta post mia longtempa senesperanta vivo. Post 22 jaroj mi ankaŭ estis rekomencinto nian favoratan movadon. Ŝia ĉeesto estis por mi bonega ŝanco por revigligi mian E-agadon. Mi estas ege kontenta pri ŝia instruado, nova kaj moderna programo kaj ege bezonataj por mi konsiloj. Mi kaj ankaŭ ĉiuj miaj gesamideanoj el nia lando neniam forgesos tiujn agrablajn tagojn, kaj ni ĉiuj elkore dankas ŝin. Jes, ŝia vizito al nia lando estis grava kaj granda paŝo por restarigi E-agadon en nia regiono. Ni kun Tatjana L. senĉese interparolis pri la estonteco de nia Landa Asocio kaj entute pri la tutmonda E-movado, kune planis niajn efektiviĝotajn celojn. Unuvorte, ŝia alveno al nia lando inspiris nin por vigle paŝi antaŭen kaj ni, UzEA-anoj, refoje dankas ŝin kaj aliajn personojn, kiuj organizis, prizorgis kaj subtenis tiun projekton kaj deziras al ĉiuj niaj gesamideanoj sukceson, feliĉon kaj brilan estontecon!

Nuntempe mi havas du E-grupojn, en kiuj oni lernis la lingvon : ĉiu grupo havas lecionojn du fojojn semajne. Kelkaj gekursanoj venas eĉ el aliaj malproksimaj provincoj. Krom tio ni malfermis E-teatron studion, kie oni povas roli, kanti kaj muziki.

Jam baldaŭ finiĝos nia kurso por komencantoj. Post la fino estas planata veturo de miaj junaj gelernantoj al Samarkando



por renkontiĝi kun tieaj gesamideanoj kaj por stimuli ilin al plia E-aktivo. Ekde novembro komenciĝos E-kurso en nova grupo kun multaj dezirantoj.

En komencaj tagoj de oktobro vizitis nin s-ro d-ro Kobashi, sperta esperantisto el Japanio (en la foto, kvara homo de dekstre en la dua vico), kiu restis ĉi tie dum du semajnoj. Li vizitis unu el niaj lecionoj kaj interparolis kun la gelnantoj. S-ro Kobashi estis ege kontenta pro nia sukceso. Li plezure interparolis kun la gekursanoj, multe demandis ilin kaj ili ĉiuj ĥore respondadis. Poste, ĉe la fino de lia vizito, ni organizis malgrandan, sed interesan kulturprogramon. Venis ankaŭ du famaj uzbekaj kantistoj kaj ni ĉiuj kantis kaj samtempe vespermanĝis.

Finfine organizaj malfacilaĵoj jam restis malantaŭe. En proksima estonteco ni povus okazigi ne nur regionan, sed ankaŭ internacian E-aranĝon.

Gafur Mirzo, prezidanto de UzEA

Esperanto en Azio kaj Oceanio (Azia-Oceania Komisiono de UEA pri Azia-Oceania Esperanto-Movado) N-ro 101 Bulteno de KAEM Oktobro 2018, pp. 19-20

Disertaĵo pri Esperanta temo en Ukrainio

En aprilo 2018 Julija Klimenko (Pedagogia universitato de la urbo Umano) defendis la doktoran disetacion "СОЦІАЛЬНО-ПЕДАГОГІЧНІ ЗАСАДИ РОЗВИТКУ ЕСПЕРАНТО-ПУХУ В УКРАЇНІ (кінець ХІХ – середина 30-х років ХХ століття)". Mi konatiĝis kun la autorino rete kaj ricevis la monografion. La tekston de la aŭtoreferato kaj disertaĵo oni povas trovi en reto (vd., ekz. https://revolution.allbest.ru/pedagogics/00942416_0.html#text). Estas tre bonkvalita laboro. La autorino posedas E-n en meza parola nivelo. Gravaj multaj dokumentoj, kiuj estis analizitaj kaj kiuj montras, sub kiu premo kaj suspekto estis esp-stoj en cara Rusio kaj Sovetunio. Bone, ke nun estas alia tempo kaj ni kune laboru por disvastigi E-n.

Nina Daniluk

Fondusoj

Donacintoj de la fonduso «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev» 16.12.2017–15.12.2018

Dum la periodo 16.12.2017–15.12.2018 en la fonduson de REU «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev» venis 2000 rubloj.

Listo de la kontribuintoj:

Boris Zozula (Rostov-na-Donu);

Aleksandr Lebedev (Jegorjevsk).

sume: 2000 P.

La kolektita mono estis ĝirita al Yandex-monujo de eoru.ru.

Gastoj de REU

Rondvojaĝo kun violono tra Rusio en aŭtuno 2018



Mi revenis hejmen en Bretonion (okcidentan Francion) post granda rondvojaĝo tra Rusio. Estis kvazaŭ esperantista turneo kun volontula manaĝero.

Kiam ni konatiĝis antaŭ 2 jaroj, Svetlana Smetanina, la prezidantino de REU, invitis min prelegi en ŝia grandega lando. Ŝi proponis skribi invitleteron por ke mi petu kulturalan vizon kaj ŝi organizis mian turneon en plurajn klubojn dum tuta monato (revigligo de konata strategio en la historio de Esperanto.)

Ŝi elektis urbojn kaj klubojn kaj mi petis iri ankaŭ al Barnaul por viziti familion kun 2 denaskuloj (ankaŭ mi spertis izolecon kiam mi estis juna dum mi parolis Esperanton al mia edzo kaj niaj 2 gefiloj. Nur post la nasko de la 3a bebo ili ĉiuj kapablis respondi en Esperanto. Nun plenkreskaj ili kun mi plu komunikas nur Esperante.)

Ĉiu el la kluboj mem aranĝis miajn akcepton, restadon kaj agadojn.

Interesaj por mi estis tiuj agadoj ĉar ili celis diskonigi Esperanton al diversaj publikoj, konatiĝi kun la lokaj esperantistoj, inspiri la komencantojn.

Necesis de mia regiono Bretonio, al Barnaul en Siberio, 3 flugoj. Revene mi flugis de Sankt-Peterburgo, nur 2 flugoj. La flugbiletojn al kaj de Rusio mi mem pagis kaj la lokaj kluboj (aŭ individuaj responsulo) pagis la veturadojn per trajno inter la urboj. Anekdote, foje mi pasigis 50 horojn en la trasiberia trajno (nun mi scias ke oni ne diru «transsiberia»), sen povi komuniki krom per gestoj, flugfolio pri Esperanto en la rusa kaj mia violono. En komforta vagono kun samovaro, ĉiu vojaĝanto libere uzadas ornamitan tetason nomatan kruĉo, kiom romantike !

La lokaj esperantistoj vizitigis al mi sian pitoreskan urbon: Barnaulo, Novosibirsko, Jekaterinburgo, Krasnojarsko (jes, necesis tiu zigzago), Kazano, Ĉeboksaro, Moskvo, Sankt-Peterburgo. Ĉiun urbon senescepte mi povis foti dum bela suna tago, sub blua tre luma ĉielo kaj ankaŭ dumnokte kun brilaj koloraj lumigadoj.

La unua surprizo por mi estis la vasteco de la riveroj (mi unualoke vidis Obon) kaj la larĝeco de la trotuaroj kaj vojoj. Kompare kun Francio, ili estas puraj kaj ne videblas armitaj policanoj. Eĉ en stacidomoj mi ne vidis soldatojn kun armiloj (mi malŝatas armilojn kaj uniformojn.) Mirigis min la oftaj blueverdaĵoj, ĉiuj nuancoj de turkiso.

La lokaj esperantistoj akompanis min al tre diversaj kaj multaj muzeoj kaj restoracioj, al mirindaj spektaklejoj (vi nepre vidu kiel aspektas rusia operejo!), parkoj, memorejoj, limoj inter Eŭropo kaj Azio kaj diversaj mirindaĵoj. Foje mi piediris 10 kilometrojn en la tago, en la bela «virina somero» kiel diras la rusianoj, fotiĝinte sub flaviĝantaj arboj kaj violonante apud riverbordo de Jenisejo...

Ĉiuj kluboj organizis por mi rendezuojn por ke mi parolu pri Esperanto, kiu ebligis mian vojaĝon. Ili kreis afiŝojn kaj reklamis. Foje la afiŝon en socia medio vidis ne esperantista publiko kiu do invitis min al prelego en la franca en la « Alliance française ». Mi ankaŭ avertis ĉiujn proksimulojn per Amikumu.

Sekve, mi elpaŝadis per Esperanto kaj prelegis en elementaj kaj mezaj lernejoj, gimnazioj, muziklernejoj, bibliotekoj de universitatoj, kursoj de franca lingvo, asocio de amikeco kun franca kulturo, lingvolernejo, alternativaj, kulturaj kaj vegeterantaj kafejoj... Violono allogas kaj dume mi prezentas Esperanton.

La plej popularaj el miaj proponoj estis :

- simple prezenti min kaj instigi demandadon (ĉu en la franca, ĉu en la rusa, helpe de esperantisto kiel interpretisto)
- montri mian landon (mi kunportis mapon de Francio kaj plurajn filmetojn kiujn mi libere komentas)
- koncerti kaj dancigi la publikon (« Violono de la Mondo » estas aktiviga koncerteto kie mi divenigas la devenlandon de ĉ. 60 melodioj.)

Mi dancigis diversajn publikojn per mia 5 korda violono. La rusianoj mirigis min per sia bonvolo danci kaj kapablo rapide lerni popoldancojn.

Fini prelegon per popoldancado postlasas malstreĉan, familieran, etoson.

Foje mi ankaŭ uzadis mian manpupon, fadenmarioneton, etan klaŭnon kiu violonas, kiel surprizon.

Okazis ankaŭ videotelefona kontakto kun la komencantoj de mia loka vilaĝeta grupo. Ili scivolis vidi miajn rusiajn gastigantinojn, per Vacapo kaj kie precize ili loĝas per Guglomapo.

Kaj dankon al diversaj esperantistoj pro privortaj diskutoj, mi poluris mian lingvouzon, mi nun ĝuas uzadi ekz. « estiĝi » kaj « elpaŝi ». Kiel mi povis vivi sen ili ĝis nun ? Ankoraŭ malfacilas konsideri objekto konstruaĵon, mi ne povas senti « objekto » ion pli grandan ol fenestron aŭ ŝrankon...

Mi finu mian raporton per la ĉefa rimarkindaĵo : la rusianoj estas TRE gastamaj kaj kompleksaj. Ne nur ke ili varme brakumas vin (anstataŭ kisi) sed ili ĉion eblan faradas por plezurigi vin. Ne mirige ke Rusio okupas 9 paĝojn en la libreto de la Pasporta Servo. Ne mirinde ankaŭ ke post disiĝo, en trajno, mi nostalgie sopiras pri miaj novaj geamikoj.

Jam la sekvan tagon de mia rehejmenigo mi faris la unuan prezenton de fotoj de vojaĝo al malferma publiko. El inter ili rusparolantino, rutenino loĝanta en mia vilaĝeto. Imagu ke ŝi kun la edzo lernis E-on antaŭ 30 jaroj kaj ŝi promesis ekpartopreni en mian E°-kurson mardon en mia vilaĝo! Poste 3 aliaj bildprezentoj okazis en mia regiono!

Neatendita sekvo de tiu aventuro: mi planas reflugi al Rusio post du monatoj kaj duono, ĉar mi akceptis proponon volontuli kiel instruisto de Esperanto en la privata lernejo de A. Blinov en Ĉeboksaro, en la aŭtonoma respubliko Ĉuvaŝio, dum tri monatoj. Pro tio mi eklernas la rusan, por iomete pli scii ol « blini » kaj « patak » !

Esperanto estas ne nur lingvo sed ponto inter homoj, por interfratiĝo kaj amikeco.

Fransoazo, Françoise Noireau

fransoazo@uea.org, violonsourire@gmail.com

+33609120374, +79232517742 (21/12/2018 – 19/03/2019)

Novajoj pri Esperanto-kulturo ***Nova nomo***

Tiu ĉi numero de la Bulteno de REU havas, se vi tion rimarkis, la numeron 100. Dum jaroj ĝi havis diversajn aspektojn, aperadis en simpla formo aŭ estis nur rubriko de REGo...Nun, pro pligrandiĝinta amplekso, ĝi, laŭ opinio de certaj REU-anoj, meritas iun konkretan nomon – kaj en la pasinta numero ni anoncis kolektadon de viaj proponoj. Bedaŭrinde, nur du personoj reeĥis, sed unu el ili proponis plurajn variantojn:

RuBeno, Bero (BERo), EBUro, RuBE (ŝerco...), VeRe (Verda revuo), VerBo (Verda bulteno), Revo

La alia nur la jenon:

Verda Vento

Ni ne aŭdacas tuj decidi, tial bonvolu skribi al nikolao@jandex.ru kun temlinio “nova nomo” viajn preferojn, kaj la Estraro de REU surbaze de viaj (kaj ankaŭ siaj) opinioj faros la decidon.

La red.

Bulteno de REU (BdR) estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo “RUSIA ESPERANTISTA UNIO”
BdR atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru aŭ (kaj) Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktofino 24.12.2018